Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de **Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj**

NI SENDAS AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KUN KONATA RETADRESO

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

auto 22/12/2012 Naŭdeka Eldono 2012 22/12/2012 SENDITA

Mallongaj Informadoj, Diskutoj, Sugestoj, de vi kaj ni.
Se vi trovas bonan informon, informu Aŭstraliajn Esperantistojn.

Ni invitas ĉiujn Esperantistojn kontribui al tiu novaĵletero.
Preferas mallongan leteron, pri kaj en Esperanto, kun via nomo.
Vi respondecas pri ĝia enhavo.



Pensu!
Kritiku!
Laŭdu!
Skribu!
Progresu!

Tiu ĉi letero havas "hiperligilojn" al retpaĝoj KLAKU! KLAKU! KLAKU!

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rspring@tpg.com.au;

Provlegita de Nicole Else

La informaj paĝoj kaj nomoj nur aperos en la dekaj eldonoj

GRAVAJ DATOJ vidu Tamen Plu redaktas Katarina Taggart

Se vi ne ricevas Tamen Plu aŭ 'Aŭstraliaj Esperantistoj', aŭ ricevas dufoje, informu AE.

NOVAĴOJ

ALKLAKU la hiperligilojn







AŭSKULTU, LEGU **ESPERANTAN RETRADION** TAGE Informaj rakontetoj, Bona lingvo, Malmultaj minutoj. Plibonigu vian Esperanton

http://members.aon.at/aldone/peranto/index.html

3ZZZ

En Melburno vi povas aŭskulti lundon de la 1a ĝis la 2a ptm je 92.3 FM



De ie ajn en la mondo eblas aŭskulti dum la semajno kiam la programo estis elsendita je 3zzz.com.au aŭ iam ajn en la arkivigejo www.melburno.org.au. Aŭdeblas la voĉo de Alan Bishop, Karl Egger, Laszlo Farkas, Franciska Toubale kaj de multaj intervjuitoj

Kontaktu 3zzzesperanto@gmail.com

Fabeloj Ilustritaj

Azeno kiu donas Oron

http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj/





KLUBNOVAĴO

Informas la aktivaj kluboj kaj grupoj

(Griza signifas ke ne estas nova informo)







Central Coast Esperanto Club

kunvenis Sab 2ptm 8a dec 2012 Bamboo Buddha Café
221 Wattle Tree Road, Holgate NSW 2250



La Brisbana Esperanto-Societo

Ni nun havas Facebook paĝon kaj ankaŭ, ni estas ĉe
www.meetup.com/Brisbane-Esperanto-Society/
Kay Anderson



La Tasmania Esperanta Societo

kunvenas, ĉiun jaŭdon je la Metz trinkejo, Sandy Bay.
Je la 7-a ĝis 8:30 ĉe Metz kaj poste ni kutime kune vespermanĝas...
Roberto Budzul



ADELAJDA ESPEREJO, ĉe 81/9 East Tce
ADELAIDE 5000
sabate 10.30 - 12.30 Brendan Linnane gvidas
pri *La Bona Lingvo*
vendrede 10.00 - 12.00 Max Wearing gvidas
pri *Gerda Malaperis*
Max Wearing <mwearing@internode.on.net> tel (08) 8359-3375



Alvenis “Esperanto-Orfo

Kara Roger,
Ian McArthur petis, ke mi sendu al vi la tekston de lia hodiaŭa prelego en la biblioteko. Mi ŝanĝis nenion, kaj proponas, ke vi publikigu ĝin sen ŝanĝoj. Lia prononc-maniero estas mirinde bona. Li aŭdigas ĉiun "r", ekzemple, kaj lia "uj" restas "uj" (neniam "uuî"

kiel kutime diras la plej multo el niaj anglo-aŭstralianoj!) Estis interese konatiĝi kun li. Li restos en Adelajdo ĝis la 4a de januaro.
Amike,
Max.

"Virga" prelego de E-orfo,

IAN McARTHUR,

en Ŝtat-biblioteko de Adelajdo, la 20an de decembro

Ĉeestis Trevor Steele, Bob Felby, Pat Palmer, Libby Mortimer, Carol kaj Brendan Linnane, Cathy Taggert, Eileen Jones, kaj Max Wearing:

Mia nomo estas Ian McArthur, kaj mi naskiĝis en Wooloomoloo. Wooloomoloo estas antaŭurbo en centra Sidnejo. Mi ne havas fratojn, kaj mi ne havas onklojn aŭ kuzojn. En mia infanaĝo en Sidnejo, mi pasigis multajn jarojn en pluraj orfejoj, kaj mi ricevis sole bazan edukadon en multaj lernejoj.

En la jaro 1973, kun mia edzino kaj filino, mi translokiĝis el Sidnejo al Adelajdo. Mi restis ĉi tie en Adelajdo dudek-sep jarojn. Nun mi estas emerito, kaj mi loĝas kun mia edzino en bela domo en la urbeto, Ulverstone, apud Bass Markolo, en Tasmanio.

Antaŭ iom da jaroj, tute memstare, mi komencis lerni Esperanton tute sola, kaj nun, por la unua fojo, mi estas renkontanta aliajn esperantistojn. Ĉi-jare mi decidis kontakti la esperanto-komunumon en Adelajdo. Mi pertelefone parolis kun Max Wearing, kaj li afable invitis min al sia hejmo. Tial, hieraŭ Max estis la unua esperantisto, kiun mi estas renkontinta.



La Melburna Esperanto Klubo

Kiel kutime, la Melburna Esperanto Klubo renkontiĝis ĉe Ross House je 6.30 ptm lunde. Heather

Esperanto Kafo Klubo de Kanbero kunsidas ĉiujn vendredojn je la 5a ptm en Cafe Fontaine kiu troviĝas en la plej supra nivelo de la Canberra Centre.



La Manlia Esperanto-Klubo Ĉiuj bonvenaj. Unu taso da senpaga kafo Bavarian Beer Cafe, Manly Wharf; Manlio kunvenos la 5an de Januaro




Esperanto-Domo Sidnejo

BBQ lastaj dimanĉoj de la monato (krom decembro) Ĉiuj bonvenaj

Zamenhof-Tago la 16an de decembro 27 subskribis la bonvenigan libron. Bob Bain, Christine Holliss, Dale McManus, Dianne-Peter-Ken Mitchell, Dmitry Lushnikov, Jo-Eric-Karina Turvey, Roger-Mei Springer, Michael Waters, Nicole Else, Richard Delamore, Keith Bowling, Joseph Leljak, Margaret Chaldecott, Eunice Graham, Volo Gueltling, Ian Wylles, Michael Rice, Henriette Vanechop, Matthew Fitzsimons, Colin Robinson, John Casey

Zamenhofa Tago





Naskiĝkuko por la 94a naskiĝtago de Eunice Graham

La varma tago fuŝis la literojn sur la 5kga kuko










Ĉu via klubo/grupo kunvenis? as? os?

Maldetala informo sufiĉas. Kiuj ĉeestis? . rspring@tpg.com.au



Kia estis via Zamenhofa tago?

Kiom aŭ kiuj venis? Informu la Esperantan familion

Ĉu vi fotis bone? Sendu la plej bonan al ni.

Vi apartenas al la Esperanta Familio de Aŭstralio. Helpu nian familon koni unu la alian. Skribu

AEA Informas

AEA estraro kunvenis 20/12/12

AEA raportas:

Nian lastan Skype estrarkunvenon (20/12/2012) ĉeestis Heather, Indrani, Margaret kaj Sandor.
Ni povis aŭdi Heather, sed ŝi ne komprenis kion la aliaj diris.

La ĉefa diskutero estis la
__Melburna Kongreso__
Intertempe preskaŭ 40 homoj aliĝis.
Ĝis nun ni organizis la jenajn programerojn:

- Ordigo de la AEA arĥivoj (Katja Steele, Huigh Malcolm, Barrie Cledsmith, Terry Manly)
- Kongresa temo: Bonvola Kongreso. Kiel rekrei pozitivan etoson en AEA
- La estonto de AEA
- La valoro de niaj arĥivoj (Katja Steele)
- Kvizo (Trevor Holton), Kultur-“bingo” (Nicole), Debato (Daniel Kane)
- edukado.net (Hazel Green)
- Individuaj prezentadoj
- Ekskurso
- La simia reĝo (Daniel Kane)
- Lingva kurso (Trevor Steele)
- Nia nova retejo (Jim Radford)
- Bankedo, sabaton vespere

La programo evoluas kaj ni vere ŝatus ke ĉiu partoprenanto kontribuu ion.
Se vi volas/povas/ŝatas kontribui, ne hezitu kaj kontaktu nin.

Ankaŭ la diskuto pri nia
Arĥivoj daŭrigis. Kiel ni menciis antaŭe, la materialoj estas ege multnombraj, kaj ni baldaŭ ankaŭ ricevos la librojn de Don Broadribb.
Ni esploris la eblecon lui alian ĉambron ĉe Fort Knox,…. sed finfine Heather ofertis sian domon kiel lokon por trarigardi la materialojn antaŭ la kongreso.
Ni vere bezonas helpon.
Se vi ŝatus/povas/volas trarigardi la arĥivojn kaj komenci klasi la dokumentojn, ... kontaktu nin. Tuj.

Ni daŭrigas la serĉadon por
* **Du novaj estraranoj.**

Gordon ekde la komenco kaj Max ekde du monatoj ne partoprenis niajn kunvenojn. Do, ni serĉas novajn estraranojn.
Interesa laboro. Interesaj kolegoj. Interesa lingvo.
Pensu pri ĝi kaj alparolu/sciigu nin.

Heather, Indrani, Margaret, Sandor

LETEROJ mallongaj de la legantoj



Malpli ol duona paĝo

Eble vi povas mencii la subajn fabelojn en iu venonta Novaĵletero.
Karaj,
Varma tago hodiaŭ! Ne estis neceso ke mi iru for de la Esp domo, do simple sidis apud la komputilo por forigi iom la troaĵon kiun mi havis.



Feliĉa tago hieraŭ (Zamenhofa tago). Hejmenveninta tra la Lernejo, mi vidis en ĝia granda rubujo multajn paĝojn - presitajn sur nur unu flanko, en la kutimo de tiaj publikaj lernejoj, do iom poste mi iris tien kun la malgranda butikumĉaro kaj revenis kun ĝi preskaŭ plenplena. Do mi devis apartigi la uzeblajn kaj neuzeblajn paĝojn. Fine venis tempo por iri en la liton, kaj kvankam mi ne finis la apartigadon, mi kalkulis ke eble mi nun havas pli ol 2,000 paĝojn uzeblajn.

Margaret Chaldecott

Bitcoin (BTC) estas malcentra kibernetika-kripta monero.
Bitcoin estas eksperimenta nova cifera mona sistemo? http://bitcoin.org/

RESPONDO AL "DU NOVAJ ESTRARANOJ" (Vidu *AE89*)



Mi vidis la supre cititan inciton kaj respondas, ke nek Gordon nek Max proponus la maldungon de iu ajn "President" aŭ alia "Director" de AEA. Tia propono estus kontraŭleĝa laŭ la aktuala AEA-statuto. Mi jam strebis proponi, tamen, ke tiu statuto estu nuligita kiel eble plej baldaŭ, kaj ke AEA refariĝu aŭtentika asocio kun aŭtentike asocia (anstataŭ kompania) statuto. Mi restas direktoro, intertempe,
Max Wearing, Director of Implementation (=Events).

BONEGA NASKIĜDAT-REVENO EN MELBURNO



Estis granda plezuro ĉeesti la celebron de la naskiĝ-datreveno de Alida Leereveld (90-jara), Marcel Leereveld (95-jara), kaj L.L.Zamenhof (153-jara) en restoracio La Notte, 140 Lygon St, CARLTON la 15an de decembro. Adelajdano Bob Felby faris bonegan paroladon honore al tiuj tri. Mi bedaŭris, tamen, ke la okazaĵo ne estis AEA-reunuiĝa ceremonio. Marcel Leereveld diris, ke li volonte remembriĝus al AEA post readopto de asoci-stila AEA-statuto. Ni ne forgesu, ke danke al Marcel, Esperanto estis akceptata en Tasmanio kiel studtemo por matrikuliĝo dum la 1960-aj jaroj, kaj ke Marcel estas antaŭa Prezidanto, Ĉef-ekzamenisto, kaj Fratulo de AEA.

Max Wearing.

Karaj,

Edukado.net ĵus donis premion al 13 Esperanto-intruistoj, vidu http://www.edukado.net/novajhoj?id=299

2 el ili estas aŭstralianoj:

Franciska Toubale http://www.edukado.net/biblioteko/panteono?iid=104

Trevor Steele http://www.edukado.net/biblioteko/panteono?iid=112

Gratulojn al ili! Amike, Nicole




Karaj,

Plia libro en la serio Tinĉjo ĵus estis eldonita. Vidu http://esperanto-france.org/la-aventuroj-de-tincxjo-la-templo

Amike, Nicole

LETEROJ IOM LONGAJ

Pli ol duona paĝo





AE informaj kaj nomaj paĝoj sekvas

Listo de individuaj ricevantoj de Esperantaj elsendaĵoj en la adresaro de Aŭstraliaj Esperantistoj.

	First name	Family Name	Colin	Robinson	Henry	Broadbent	Linda	Fields	Rees	Pearse
	Abid	Afridi	Colin	Giles	Herve	Diviciacos	Lucien	Giloteaux	Renjo	Oren
	Alan	Mendelawitz	Crystal	Hill	Howard	Gravatt	Marc	Schmidt	Richard	Delamore
	Alan	Turvey	Dale	McManus	Hugh	Malcolm	Marcel	Leereveld	Richard	Marcus
	Alan	Bishop	Dana	Diggles	Ian	McArthur	Margaret	Chaldecott	Richard	Penman
	Alan	Collinson	Daniel	Forrest	Ian	Green	Margaret	Yue	Robert	Budzul
	Alan	Dean	Daniel	Kane	Ian (Jano)	Wylles	Margarita	Pavlova	Robert	Hoogenboom
	Amy	Regal	Danton	Black	Indrani	Beharry-Lall	Marika	Fox	Roger	Springer
	Andrew	Adams	David	Astle	Ivan	Pivac	Marina	Lobanova	Roger	Hill
	Andrew	Lutz	David	Dalgleish	Jaga	Oprzedek	Marjorie	Johnson	Ronald	Gates
	Andrew	Voutsis	David	Kidd	James	McElvenny	Mark	Pavic	Sandor	Horvath
	Andrew	Spannenberg	Dennis	Murphy	Jay	Mooney	Mark	Smith	Sandor	Monostori
	Angela	Maag	Dianne	Lukes	Jennifer	Birchall	Martin	Gray	Sandra	Connors
	Anne	Sanders	Dianne	Mitchell	Jenny	Bishop	Marumi	Smith	Shane	Leddin
	Anthony	Gaskell	Dmitri	Lushnikov	Jim	Radford	Mary	Mills	Shayne	Power
	Barbra	Treharne	Dorothy	Bysouth	Jo	Turvey	Matthew	Fitzsimon	Shirley	Gradussov
	Barrie	Cledsmith	Dzejlana	Haveric	Joffre	Bell	Matthew	Maguire	Shresta	Kishor
	Barry	Healy	Edith	Mejia	John	Casey	Matthew	Meldrum	Sibel	Lewis
	Benjamin	Hook	Edna	Watson	John	Abood	Max	Wearing	Sidney	Wolfson
	Beth	Wearing	Elizabeth (Libby)	Mortimer	John	Adams	Michael	Waters	Simon	Gelin
	Beth Maree	Shields	Elrae	Adams	John	Forbes	Mick	Gallagher	Stephen	Landman
	Betty	Hart	Erhard	Claus	John	Gallagher	Mike	Taggart	Stephen	Pitney
	Blaze	Doric	Erin	McGifford	John	Massam	Miranda	Lutz	Svetislav	Kanachki
	Bob	Bain	Esther	Parris	John	Garvey	Nancy	Roy	Szymon	Gryg
k	Bob	Felby	Finnur	Larusson	Jonathan	Cooper	Nicole	Else	Terry	Manley
	Brendan	Linnane	Franciska	Toubale	Jonathan	Moylan	Owen	Loneragan	Thomas	O'Gliasain
	Brian	Dance	Fujun	Xiao	Jorge	Gallegillos-Pozo	Pamela	Fenton	Tim	Stackpool
	Brodie	May	Gerry	Phelan	Kam	Lee	Patricia	Palmer	Tim	Warren
	Carol	Lutz	Giles	Thomson	Katja	Steele	Patrick (Lize)	Zhang	Trevor	Steele
k	Caroline	Turner	Glyn	Truscott	Kay	Andersen	Paul	Desailly	Trish	O'Connor
	Catherine	Chen	Gordon	Coleman	Keith	Bowling	Paul	Gorny	Vera	Payne
	Cathy	Taggart	Grace	Alvarez	Ken	Rolls	Paul	Green	Vicky	Crickett
	Chan	SY	Gus	Faith	Kep	Enderby	Penny	Vos	Volo	Gueltling
	Charles	Stevenson	Hazel	Green	Kerry	Robson	Peter	Mitchell	Yaw	Badu
	Cho	Kyung-Mi	Heather	Furby	Kevin	Warburton	Peter	Bird	Yvan	Serve
	Chris	Krageloh	Heather	Heldzingen	Kiah	Morante	Peter	Danzer	Yvonne	Harvey
	Chris	Morrow	Helen	Webb	Kirsi	Rossi	Philip	Nichols	Bradley	McDonald
	Christine	Holliss	Helen	Palmer	Laurie	Kirwan	Philip	Smart	David	Dewar
	Clivia	Frieden	Henriette	Vanechop	Lev	Lafayette	Rainer	Kurz	David	Ryan

La noma listo de "Aŭstraliaj Esperantistoj" havas homojn kun konata nomo kaj retadreso.

Se vi deziras ke via nomo estu sur tiu listo de ricevantoj, abonu! rspring@tpg.com.au

Se vi deziras ke via nomo ne estu sur tiu listo de ricevantoj, malabonu!

Se vi deziras ke nomo de familiano estu sur tiu listo de ricevantoj, informu min.

Mi povas krome plusendi mesaĝon al individuo kiu estas en la supra listo.

Mi ne donas adresojn al petantoj.

Viaj leteroj al AE, devas montri vian nomon kaj se vi deziras, retadreson se vi akceptas, ke ĝi estu montrata post via letero.
Mi ne aldonas iun ajn retadresojn se la skribanto ne mem faras tion.

Ĉu vi ŝanĝos vian retadreson? Informu min. rspring@tpg.com.au;

La adresaro de "Aŭstraliaj Esperantoj" estas uzata krome por sendi Tamen Plu, Telepeon, urĝajn anoncojn kaj se vi deziras vian bonan ret-gazeton al ĉiuj homoj listigitaj en la adresaro de Aŭstraliaj Esperantistoj.

La ‚Aŭstraliaj Esperantistoj' (AE) publikigas vidpunktojn en Esperanto, sendepende ĉu vi estas membro de kluboj aŭ asocioj.
Skribu al ĉirkaŭ 200 legantoj, en Esperanto mi petas.

La Novaĵletero Aŭstraliaj Esperantistoj estas elsendata almenaŭ unufoje semajne

La novaĵletero 'Aŭstraliaj Esperantistoj' subtenas liberan sinesprimon kaj honestajn kaj senkaŝajn artikolojn. Sed ni rezervas la rajton modifi aŭ forigi viajn komentojn se ni konsideras ilin esti ofendaj aŭ tro malrespektaj. Ni nun provlegas ankaŭ la leterojn kaj korektas la mistajpojn kaj gramatikajn erarojn.

Se oni prokrastas ĝis perfekteco, oni faras nenion, ĉar la morto atendas vin.
Ne Ĉagreniĝu! sed Parolu!, Skribu!,

Interesaj faktoj

Mezura sistemo havas metran logikan facilan sistemon ekde 1795.
Lingvoj havas logikan facilan Esperanton ekde 1887.

Muziko havas bekflutojn (school recorders) por instigi studentojn lerni pri muziko.
Lingvoj havas Esperanton por instigi studentojn lerni pri lingvoj.

Esperanto estas la 27a lingvo en la listo de lingvoj laŭ nombro de artikoloj en Vikipedio (entute 285 lingvoj estas uzataj tie).

Senpaga Freelang vortaro estas tre uzinda kiam vi skribas, legas per komputilo
Plena Ilustrita Vortaro (PIV) estas surrete. http://vortaro.net/

Uzu Esperantajn literojn Por vindozaj komputiloj. Ek! aŭ Tajpi

La epoŝta programo "*gmail*" de Google transsendas la esperantajn literojn tute bone

La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ 5 minutan aŭskult/legon tage.

Nun vi povas lerni ankaŭ Esperanton per **lingibli.** http://eo.lingibli.com/

Kurso de **Esperanto** - Main page http://www.kurso.com.br/index.php?en

lernu! - Learn **Esperanto** online. Live tutors, dictionary, books & music **lernu**.net/

Rekomendata Legado

"*Mirmekobo*," de Donald Broadribb mirmekobo.com
"Tamen Plu" de Katarina Taggart Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj
"Telopeo" de EFNSK Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj
"Esperanto sub la Suda Kruco" AEA www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
Via kluba Novaĵletero? Laŭ peto, ni sendos retkopion al niaj konataj retadresoj
la Esperanta Retradio retpaĝo por aŭskulti kaj legi Esperanton
http://ckuik.com/Esperanto Eniro por multegaj Esperantaj videoj de Jutubo
http://www.bookbox.com/ La rakontoj estas laŭtlegataj de diversaj personoj
Traduku anglan al Esperanto senkoste aŭ google tradukilo

La gastĉambro de EFNSK devas esti antaŭmendita de estontaj gastoj. Neniuj Esperantistoj loĝas tie aŭ proksime por helpi gastojn, kiuj ne antaŭmendis. Se eble antaŭmendu almenaŭ 2 semajnojn antaŭe. Tio helpas nin por prepari la ĝastĉambron.

Skajp-anoj, metu vian adreson ĉi tie. Skype name Mary Grace Mills (Orange nsk)



Skribu al AE

en Esperanto

